trimonatulo

Balkana Verda stelo

1 sept. **2015**

Preskaŭ la duono de ĉiuj rifuĝintoj en la mondo jam vivas pli ol kvin jarojn en ekzilo. En tendaro Mahama, Ruando, kuirado devas okazi ekstere.

Unu el sesdek signotabuloj, kiujn starigis makedona viro laŭ la fervojo por averti migrantojn pri la danĝeroj kaj direkti ilin al akvofontoj.

speciala temo:

migrantoj



La migranto-krizo:

- Enkonduko al rifuĝado 2
- Kial Germanijo estas tiel alloga? 3
- Kontrolado ĉe la landlimo kaj "Dublinkazoj" 4
- Familiano en EU-lando 5
- Migradaj itineroj direkte al Eŭropo dum unua duono de 2015 6
- La okcidentbalkana itinero 7
- Ŝtatanoj de la Okcidenta Balkanio 7
- Azilpetoj en 2013 kaj 2014 en Balkanio 10
- Tra Makedonijo 11
- Hungara urbestro poras la konstruadon de krado 12
- Germanoj manifestacias ĉe barilo de Bulgar-Turka limo 12
- Azilpetantoj kaj migrantoj en Serbijo 13
- Historio de la barilo inter Turkijo kaj Grekijo 14
- Turka ĵurnalo pri azilpolitiko de Syriza 15
- *Vice News* pri azilpolitiko de Syriza 15
- Filmo ĉe la Greka-Turka landlimo 16
- Streĉiĝoj inter Italijo, Francijo kaj Britijo 17
- EU-landoj ne atingas interkonsenton pri divido de migrantofluoj 18
- Trans mediteraneo al grekaj insuloj 18
- Belgradanoj brakumas siriajn rifuĝintojn 37

Literaturo:

- Espero de Iris Otto 20
- La pura vojo de Ivan Vazov 22
- limerikoj de Valentin Melnikov 25
- Ŝercoj de Mirić Jadranka 25

Novaĵoj pri la E-movado:

- Internacia Amikeca Renkontiĝo en Brežice 26
- Poezia Vespero dediĉita al Venelin Mitev en Razgrad 28
- Lillo, 25 julio – 1 aŭgusto 2015 29
- Rimarko el Rumanijo pri la UK 30
- Ekstera observanto pri la rezolucio en Lillo 31
- 13-a renkontiĝo de esperantlingvaj verkistoj kaj tradukistoj 31
- Rezultoj de KER-ekzamenoj en Subotica, 30-5-'15 32
- Raporto de Stela pri 26-a IJS en Szentgotthárd, Hungarijo 32
- Publika letero de Marian Vochin el Rumanijo 33

Ĉu vi konas la Fundamenton de Esperanto? 35

Respondece de Johan Derks, redaktanto

Ĝis hodiaŭ ekzistas la fenomeno, ke individuaj esperantistoj estas izolitaj de la movado, ĉar ilia klubo ne plu funkcias aŭ ili ne sentas sin reprezentataj de sia landa asocio. La organiza strukturo laŭ naciaj asocioj malfaciligas al ili agi internacinivele por la interna ideo: interkomprenigadi la popolojn. Tristigas konstati ekzemple, ke en kluboj kaj eĉ en naciaj kongresoj oni ne konsekvence parolas Esperanton. Tiurilate mi elkore subtenas la pledon de Janez Jug, Slovenijo, pliintensigi la intersocietajn interŝanĝojn, specife internaciajn.

Gazeto kiel "Balkana Verda Stelo" provas helpi al regiona informado kaj pliintensigado de kontaktoj.
La revuo ne havas ankoraŭ perantojn tra kiuj pagi la abonkotizon. Sed en ĉiu sud-orienteŭropa lando oni havas esperantistojn kun konto ĉe UEA. Mi atendas sciigon de samideanoj, ke ili pretas peri la pagon por siaj samlandanoj de € 16,= por la jarkolekto 2015-'16 (sept.-dec.-marto-junio) al bvst-n ĉe UEA. Pri rabato en kazo de pluraj abon(jar)oj petu Johan Derks (johan.derks@gmail.com).
Eĉ ne ankoraŭ formiĝis redakcio, sed ĉiu raportemulo/verkemulo povas proponi sin al mi. Tiu ĉi numero 2015-3 enhavas artikolojn el Bulgarijo, Hungarijo, Rumanijo, Rusijo, Serbijo, Slovenijo kaj Germanijo. Doloriga estas malestado de kontribuoj el Bosnio, Makedonijo, Grekijo kaj Kroatijo.
Okaze mi eldonos specialnumeron. Jam antaŭ tri monatoj mi decidis, ke tiu ĉi numero traktos la krizon de enmigruloj en Eŭropo.
Se vi havas peton pri estontaj specialnumeroj, bonvolu skribi. La fermdato pri kontribuoj por la decembra numero estas 15-11-'15.

Mi jam skribis en la nulnumero: Pri landonomoj mi decidis al finiĝo je -ijo. Mi volas justecon ankaŭ por *ujo*-preferantoj kaj tial faris jenan Salomonan decidon: Nek *-ujo*, nek *-io* mi permesas, sed la mezan *-ijo* (ne por *Bosnio*, *Ĉilio* ktp, nur por etnobazaj landonomoj). Tiu ne estas definitiva solvo, se nur ĝi instigas al pensado.

Enkonduko al rifuĝado

Kiam vi eklegas ĉi tiun artikolaron pri rifuĝantoj al Eŭropo, povas esti, ke la nombroj da ili, entenataj en ĝi jam plu ne validas. Nenio ŝanĝiĝas nuntempe pli rapide ol la situacioj de milita violento, homa suferado kaj rifuĝantoj.

En televido kaj novaĵoj preterglitas la bildoj de vicoj da homoj dorspakitaj aŭ trenantaj infanojn, kun difektitaj piedoj, ŝarĝitaj de traŭmoj el la hejmlando aŭ dum monatodaŭra vojaĝado, tamen decideme. Neniam plu post la teruraĵoj de la Dua Mondmilito la nombroj da homoj delokitaj estis tiom grandaj kiel nun. La mondo en 2015 konas 60 mln (milionoj) da ili. Preskaŭ la duono de ili jam vivas de pli ol kvin jaroj en ekzilo.

Kion ili serĉas ĉe ni? Supozeble protektadon, kaj poste vivrimedon perlaboran. Kial ni devas helpi ilin?

La deklaracio pri Homaj Rajtoj el 1948 fiksis en artikolo 14 la rajton de individuo je azilpetado en alia lando por protekti sin kontraŭ persekutado. Tiu rajto estas senutila, se la petata lando ne rekonas sian humanan devon serioze trakti tian peton. La *Konvencio pri la statuso de rifuĝintoj kaj senpatrujuloj***,** organizita de UNo en 1951, reguligis la rekonon**.** 166 landoj en la mondo poste subskribis la Konvencion, kelkaj grandaj landoj restis ekster ĝi[1].

En buŝo la publiko ofte uzas la vorton *rifuĝinto,* se oni intencas diri *fuĝanto* aŭ *azilpetanto*. Tiu kiu, terurigite, forlasas sian landon evidente estas fuĝanto kaj li restas tio ĝis kiam li alvenas en alian landon, kie li decidas peti azilon. Tiam li estas azilpetanto, sed ankoraŭ ne rifuĝinto, la aziltraktantoj povas opinii, ke ĝi ne tiel suferis persekutadon por pravigi – jam venas alia faka termino – "internacian protektadon". Tiu lando decidas pri lia enakcepto, sed laŭ reguloj, konformaj al la Konvencio. Se la praktiko ne obeas ilin, ĝi povas esti kritikata de la superrigarda organizacio por tio: UNHCR[2].

[1] pluraj arabaj landoj kaj landoj kun islamana plimulto, landoj en sud-orienta Azio, plie Mongolijo kaj Norda Koreo

[2] United Nations High Commissioner for Refugees = (*de*) *Unuiĝintaj-Nacioj Alta Komisaro pri Rifuĝintoj*.

Artikolo 14 pri la libereco peti azilon en alia lando ne difinas en kiu lando tio okazu. Ju pli evoluinta la lando, des pli alloga por la fuĝanto tie peti azilon. Por preventi grandan premon de azilpetantoj sur la riĉaj – ofte jam dense loĝataj – landoj de Eŭropa Unio, la ŝtatoj-membroj decidis en Dublino en 1997[3], ke la lando kiu respondecas pri la traktado de azilpeto estas tiu kiun la fuĝanto unua atingas, enirante Eŭropan Union. La fuĝanto tamen povas frustri tiun provizon, se ĝi petas azilon ne en la unua lando, sed en la dua aŭ tria kiun ĝi atingas. Tiam la lasta lando rajtas resendi la azilpetanton al la unua lando de la Unio, kien la fuĝanto eniris.[4]

Kial Germanijo estas tiel alloga?

Laŭ donitaĵoj de UNHCR[5] en 2013 33 000 anoj de balkanaj ne-EU-landoj[6] petis azilon en Germanijo. El tiuj 22 242 estis serboj. Signifa supreniro de azilpetoj estis registrita post kiam la Germana Federacia Konstitucia Tribunalo[7] decidis (julio 2012) pliigi sociajn monservojn kaj pagricevojn por azilpetantoj (po 350 eŭroj).

Ne estas mirige, ke kun tiuj avantaĝoj profitserĉantoj el malriĉaj landoj emas provi atingi statuson de azilpetanto en Germanijo, eĉ se ili havas neniun ŝancon pri enakcepto tie kiel rifuĝinto. Krom tio la ekonomia progreso promesas pli da laborlokoj ol alilande.

Julifine la Germana Federacia Oficejo por Migrado kaj Rifuĝintoj (BAMF) nombris 218 221 azilpetantojn. 20-8-2015 germana ministro diris kalkuli je totalo de 800 000 migrantoj aŭ rifuĝintoj por 2015. Unu tagon poste Germanujo interkonsiliĝe kun European

[3] Nun nomata "Dublino 1". Poste venis "Dublino 2" (2003) kaj "Dublino 3" (2013).

[4] Parto de la aranĝo estas la eurodac-sistemo *(European Dactyloscopy = Eŭropa fingropremado*) de EU, laŭ kiu ekzistas datenbazo de fingropremaĵoj por identigi azilpetantojn kaj kontraŭleĝe limtransirintojn. Al ĉiu azilpetanto aŭ kaptito ĉe limo la montrofingro estas premata kaj la premaĵo bite sendita al centrejo de EU. La sistemo pruvis sian efikecon, ĉar ekzemple en 2013 62 124 personoj estis identigitaj kiel kontraŭleĝaj enmigrintoj, kiuj antaŭe petis azilon en iu EU-lando, 26 145 same post kontraŭleĝa limtransiro de EU-lando kaj 103 448 ŝajne laŭleĝe petis azilon, sed antaŭe jam estis petintaj azilon en alia EU-lando.

[5] Western Balkans_Annual Risk Analysis_2014.pdf

[6] Albanijo, Bosnio kaj Hercegovino, Serbijo, Makedonijo kaj Montenegro

[7] Bundesverfassungsgericht

Council on Refugees and Exiles[8] faris ion vere bonan: Al siriaj rifuĝintoj, kiuj normale estus deportitaj reen al kie ajn ili unue eniris la Eŭropan Union, estos permesite resti kaj peti azilon.Miloj da sirianoj, kiuj estus alie alfrontis necertecon en Eŭropo povas nun komenci la procezon rekonstruadi siajn vivojn en Germanijo.

Kontrolado ĉe la landlimo kaj "Dublinkazoj"

Misuzado de la rajto je azilpeto estas neelradikigebla, sed ŝtatoj povas fari procedurojn ĉe la landlimo pli severaj. La abolo de devigo al vizo por vojaĝoj al Eŭropa Unio de okcidentbalkananoj en 2009 estis la ĉefa kaŭzo, ke la nombro de vojaĝantoj al Okcidenta Eŭropo grande kreskis kaj ke multaj ne revenis ……. Akiri certecon pri la celo de la vojaĝo estas malfacile.

Pli severan surliman kontroladon de vojaĝantoj nun ne nur aplikas la surlimaj landoj de Eŭropa Unio, sed ankaŭ la eksterlimaj landoj de Eŭropa Unio. Ekzemple Makedonijo en 2013 enkondukis pli intensivan elirkontroladon. De tiam limgardistoj demandas la elveturantojn pri necesaj financaj rimedoj, intervjuas ilin pri celloko kaj motivoj por la vojaĝo. Se estas indikoj ke la reala intenco por la vojaĝo estas misuzado de la petorajto pri azilo, al la persono la eliro estos rifuzata, surbaze de artikolo 15 de la makedona Leĝo sur landlima kontrolo. Sed ofte la fuĝanto trompiĝas pri sia ŝanco daŭrigi sian vojaĝon, kiam ĝi laŭleĝe transiras limstacion en EU.

Hungarijo rifuzis eniron en 2013 al preskaŭ 5400 serbaj ŝtatanoj, 65% pli kompare al 2012. Krom rifuzoj de eniro eldonita de Hungarijo, ankaŭ serbaj aŭtoritatoj rifuzis eliron al pli ol 6500 serbaj civitanoj kiuj ne povis pravigi sian intencon pri vizitrestado en EU kaj tial estis konsiderataj riskotrairantoj. La serba fervoro frutempe detekti eblan misuzon de la rajto de azilpetado rilatas al la averto ke EU povos reenkonduki devigon je vizo por serboj, se la nombro da azilpetoj el tiu lando konsiderinde kreskos.

Sed kiam la fuĝanto aŭ profitserĉanto jam transiris la teritorion de la cellando – laŭleĝe aŭ kontraŭleĝe – nenio povas malhelpi ĝin iri al polico kaj peti azilon. Kial serba fuĝanto, kiu vojaĝas al Hungarijo

[8] ECRE: Eŭropa Konsilio pri Rifuĝintoj kaj Ekzilitoj

petus azilon en tiu lando, se li havas parencon en Germanijo? Li preferos pluvojaĝi al Germanijo kaj ĝui la kompanion de sia parenco, certe, se li vojaĝas individue aŭ ĝuas la pagatan helpon de faciliganto[9]. La rajto resendi lin al Hungarijo ne estas absoluta. Laŭ la reguloj de Dublino la nacia Oficejo pri Enmigrado devas klasifiki azilpetanton post unua intervjuo kiel "Dublinkazon", se montriĝas ke ĝi havas eble pli gravan rilaton kun alia membroŝtato.

Familiano en EU-lando

Se azilserĉanto havas familianon en iu EU lando, tiu lando estas la ĉefa respondeculo por okazigi la azilproceduron. Tamen, la EU-reglamento[10] estas tre strikta en sia difino de familiano: Nur edzinoj kaj neplenaĝaj infanoj estas kovritaj per tiu regulo.

La rakonto de Mamun, dudek-jaraĝa siriano, montras kiel la mallarĝa difino de familio enorme influas azilprocedurojn.

> *Mamun en decembro 2011 serĉis azilon en Belgijo ĉar tie liaj gepatroj, onklo, onklino, du nevoj kaj nevino jam loĝis laŭleĝe. La junulo eniris Ŝengenzonon tra Latvijo kaj vojaĝis de tie ĝis Belgijo. Kiel plenkreskulo li ne falis sub la striktan difinon de 'familio', kio decidigis Belgijon ne koncedi azilon kaj revenigi lin al Latvijo. Tie li ekĝuis statuson de rifuĝinto. Nur per speciala vojaĝdokumento por rifuĝinto – tiel nomata "blua pasporto" - Mamun okaze povas viziti sian familion en Belgijo.*

La Dublin-aranĝon subskribis kaj ratifis la 28 membroj de EU, krome Islando, Svislando kaj Norvegijo. La ŝarĝo juĝi la azilpetojn – kaj intertempe loĝigi, nutri kaj gardi la petantojn – pezas sur la limlandoj de Eŭropa Unio: Hispanijo, Italijo, Grekijo kaj Hungarijo[11].

Por plifortigi la kontrolojn pri fuĝantoj sur la limoj de Eŭropa Unio, la koncernaj ministroj de EU-landoj interkonsentis en 2004 pri fondo de **Frontex**[12]. Ĝia ĉefa geografia labortereno fariĝis

[9] neŭtrala termino por homnegocanto: li "faciligas" la fuĝadon, ŝakristo

[10] Vidu http://eur-lex.europa.eu/legal-content/EN**[aŭ alia lingvokodo: FR, DE ktp]**/TXT/?uri=CELEX:32013R0604

[11] Bulgarijo kaj Rumanijo

[12] "Frontières extérieures", france, signifas *eksteraj landlimoj*.

Migradaj itineroj direkte al Eŭropo dum unua duono de 2015 [13]



La nombro por Grekijo enhavas proksimume 20 000 por Lesbo. Nova frekventata alvenejo estas insulo Kos kun 6 000. Du alvenvojoj estas desegnitaj por Italijo. Ilia nombro inkluzivigas alvenintojn al Malto.

Mediteraneo, por ŝirmi Hispanijon, Italijon kaj Grekijon kontraŭ invadoj de fuĝantoj el Afriko. Aliaj taskoj fariĝis trejni landlimajn gardistojn, taksraporti pri la evoluo de fuĝantofluoj kaj fuĝitineroj, apliki pli altteknikajn metodojn de limkontrolado kaj kunordigi interla landoj de EU la resendado de neleĝaj enmigrintoj. Pro la forta kresko de la nombro de transmaraj fuĝantoj tiu tasko de resendado rezultis en 2008 en forterurigaj metodoj, kiuj anstataŭ ebligi malebligas al fuĝantoj submeti azilpetojn al EU-landoj. En printempo de 2015 estis nova eksplodo de nombroj da fuĝantoj en boatoj trans Mediteraneo sub teruraj kondiĉoj, kreataj de faciligantoj. 137 000 homoj fuĝis en ses monatoj transmare, 1875 el ili dronis.[14] En majo sub premo de publika indigniĝo militŝiparoj de interalie Italijo entreprenis grandskalajn savoperaciojn.

[13] el http://frontex.europa.eu/trends-and-routes/migratory-routes-map/ kaj www.dailymail.co.uk/news/article-3162980

[14] http://www.unhcr.org/5592b9b36.html. Vidu bildon sur dorspaĝo.

La okcidentbalkana itinero

Ĉar en sud-orienta Eŭropo Serbijo-Kosovo, Bosnio-Hercegovino, Makedonijo, Montenegro kaj Albanijo ne estas membroj de EU, tie ne ekzistas leĝaro por resendi azilpetantojn al lando, kiun ili trairis antaŭe, sed ili havas la "avantaĝon", ke malmultaj fuĝantoj volas resti tie por ekkonstrui novan vivon.

Tra ili iras du ĉefaj migrofluoj: 1. de ŝtatanoj de la okcidentaj balkanaj landoj mem 2. de precipe aziaj migrantoj kiuj origine eniris Eŭropan Union trans la bulgar-turkan, la grek-turkan aŭ grek-makedonan landlimojn aŭ marlimojn kaj poste plu tra la okcidenta Balkanio, en Hungarijon. Inter la dua grupo la nombro de ŝtatanoj el Sirio kaj Somalijo plej multe kreskas.



ŝakristoŝofore = per ŝoforoj en la reto de homkomercantoj (ŝakristoj)

Ŝtatanoj de la Okcidenta Balkanio

En 2012 ŝtatanoj de la Okcidenta Balkanio ĉiam pli ekmisuzadis diversajn formojn de laŭleĝa vojaĝado, detektitajn ĉu dum limkontroloj, ĉu dum ili estis jam en Eŭropa Unio. Plej multe oni misuzis la provizojn por internacia protekto en EU-membroŝtatoj

kaj Ŝengenaj landoj. En 2012 estis preskaŭ 33 000 azilpetoj faritaj de civitanoj de la kvin nove vizo-liberaj okcidentbalkanaj landoj menciitaj supre, 53% pli ol en 2011. La nombro estis la plej alta ekde la enkonduko de vizo-libera vojaĝado en la regiono en 2009 kaj konsistigis 12% de la totala nombro de azilpetoj en Eŭropa Unio. Tiu alfluo ne povas esti klarigita el drasta plimalboniĝo de la sekureco por civitanoj en tiuj landoj, do parte la azilpeto estas ĝuste provo por la bono. Alia misuzo estis la pluvojaĝado sen peti azilon kaj neleĝa ekrestado en Eŭropa Unio. Pli precize, estis proksimume kresko je kvinono de detektoj de ŝtatanoj de la Okcidenta Balkanio kiuj submerĝis en membrolandoj de EU - ĉefe kosovanoj, serboj kaj albanoj. Ŝtatanoj de Albanio, pli ofte ol tiuj de aliaj landoj, estis detektitaj pro dokumentofraŭdo, enirante Eŭropan Union aŭ la Ŝengenan zonon en 2012, plejparte ĉar ili uzis falsitajn ŝtampojn de eniro/eliro por kaŝi la trorestadon.

En 2013 estis spertita senprecedenca kresko en la fluo ĉe la hungara-serba landlimo. Preskaŭ 20 000 migrantoj kontraŭleĝe eniris Hungarijon kaj preskaŭ ĉiuj petis azilon tie. La ŝtatanecoj inkludis loĝantojn de Kosovo, Serbijo sed ankaŭ pakistananojn, afganojn, alĝerianojn, marokanojn krom afrikanoj de sub Saharo, el kiuj multaj jam estis vivantaj en Grekijo antaŭ ol vojaĝi al Hungarijo. Ĝis januaro 2013 Hungarijo praktikis la arestadon de personoj, kiuj petis azilon post kontraŭleĝa eniro en la landon. Tiu flagra transpaŝo de EU-reguloj ne estis akceptita de aliaj landoj kaj Hungarijo ĉesigis ĝin. Tio kaŭzis enorman kreskon de kontraŭleĝaj transiroj, ĉar la lim-trapasantoj sciis, ke ili, petinte azilon estos senditaj al Nagyfa [Nadjfa] proksime al limurbo Szeged [Seged], de kie ili povos senkontrole daŭrigi sian vojaĝon. Evidente tion multaj faris. La nombro de ne-regule lim-transpaŝantoj atingis en junio la pinton: po 130 tage. La reago de la hungara registaro tiam estis plibonigi la leĝon por ebligi retenadon de tiuj kiuj estis suspektataj pri misuzo de la sistemo de azilpetado kaj plifortigi la kapaciton de limkontrolado. Tio rezultis en drameca malaltiĝo de la fluo de migrantoj en la dua duono de la jaro.

Detektoj de kontraŭleĝa limtransiro atingis pinton en 2014. Dum la dua fluo, laŭ grandeco, de migrantoj kiuj eniris Eŭropan Union tra

Turkijo daŭradis, senprecedenca nombro de kosovanoj kontraŭleĝe transiris la serban-hungaran limon. Kontraste kun aliaj okcident-balkanaj civitanoj, al kosovaj ŝtatanoj ne estis donita vizo-libera vojaĝebleco al Eŭropa Unio kaj sekve ili elektis por kontraŭleĝe eniri Hungarijon, kie ili petis azilon. Kiel konsekvenco, la hungaraj aŭtoritatoj loĝigis ilin en malfermitaj rifuĝo-centroj de kiu ili submerĝis por pluvojaĝi al aliaj landoj de Eŭropa Unio, aparte Aŭstrijon kaj Germanijon, kie ankaŭ ili petis azilon.
Kiam en la unuaj kvin monatoj de 2015 la nombroj da ne-regulaj

Kosova familio varmigante sin post ne-leĝa transiro de la Hungar-Serba landlimo apud Ásotthalom, 17-6-'15

limtransiroj denove alpintiĝis atingante 54.000 kaj tio povos fariĝi 130 000 por la tuta jaro, la hungaroj publikigis planon por konstrui altan kradon laŭlonge de la hungara-serba limo, longan pli ol 150 km por haltigi fuĝantojn. Plue Hungarijo diskonigis, ke ĝi provizore ne pretas plu plenumi la Dublinregulon, ke tiu lando de la Unio, kiun la fuĝanto atingis la unua estas respondeca por trakti la peton, kiun ĝi faris en alia lando de la Unio. Tiel la registaro volas ŝpari

tempon, por ke ĝi povu adapti la loĝigan kapaciton por migrantoj al la granda alfluo. Budapeŝto asertas, ke nun la naciaj provizoj ne kapablas venki la alfluon.

La maltrankvileco de Hungarijo pri sia kapablo kaj pri la preteco de la loĝantaro enakcepti pli da rifuĝantoj estas komprenebla, se oni konsideras ke por ĉiuj 1000 ŝtatanoj Hungarijo havis en 2013 4,2 azilpetantojn[15]. Nur Svedijo, en 2014, enakceptis pli da fuĝantoj proporcie al sia loĝantaro[16], ol Hungarijo.

Azilpetoj en 2013 kaj 2014 en Balkanio

lando	2013	2014	ŝanĝiĝo '14, relative al '13	2014, proporcie al mil enloĝantoj
Albanijo	230	430	87%	0,1
Slovenijo	240	360	50%	0,2
Grekijo	8 220	9 450	15%	0,8
Bulgarijo	6 980	10 790	55%	1,5
Serbijo kaj Kosovo[17]	5 130	16 590	223%	1,8
Hungarijo	18 570	41 370	123%	4,2

Rifuĝintoj transiras de Serbijo en Hungarijon sub la pikdrata limbarilo, apud Röszke, 26-8-'15

[15] Vidu *Asylum Trends 2013, Levels and Trends in Industrialized Countries*

[16] 81 325 sur 9 723 809, t.e. 8,36 sur mil enloĝantoj

[17] Kosovanoj transpaŝis ne-regule, ĉar ili bezonas vizon por eniri Eŭropan Union.

La Eŭropa Komisiono jam petis Hungarijon, junion 2015, ekspliki la kaŭzojn de sia nesufiĉeco kaj siajn intencojn rimedi al tio.
Eble vi, leganto, demandas, kial lando ne rajtus konstrui kradon ĉirkaŭ si por haltigi neregulan transiradon de sia limo? La respondo estas, ke por homoj, kiuj vivas sekure en sia hejmregiono kaj ne timas atakojn, efektive neregula limtransiro estas puninda kaj same por fuĝantoj, kiuj nur pretekstas serĉi "internacian protektadon", sed uzi tian kradon kontraŭ homoj kiuj estas persekutataj farus ilian homrajton[18] nerealigebla.

Tra Makedonijo

Hungarijo estas inundata de fuĝantoj. Ĝis junio de tiu ĉi jaro pli ol 60 000 da ili eniris la landon. Multaj el ili estas sirianoj kiuj elektas la "Balkanan Itineron": unue al Grekijo kaj tra Makedonijo kaj Serbijo ili piediras rekte en la zonon de Ŝengen. En Makedonijo migrantoj uzas ankaŭ sistemon de "malfermaj taksioj" kiuj grave profitas de kontrabandado de homoj al la serba landlimo. Aŭ ili aĉetas biciklon en la sudo.

Sirianoj laŭ reloj tra Makedonijo post eniro en Eŭropon tra Grekijo

[18] Vidu http://www.ohchr.org/EN/UDHR/Pages/Language.aspx?LangID=1115, artikolo 14 kaj serĉu per Guglo: DIREKTIVO 2011/95/EU de Eŭropa Parlamento kaj de Eŭropa Konsilio (13-12-2011) kaj DIREKTIVO 2013/32/EU (26-6-2013).

Hungara urbestro poras la konstruadon de krado[19]

Vi ne devas serĉi longe por trovi ilin. Sur la stratoj ĉirkaŭ la ĉelima vilaĝo Ásotthalom [Aŝotholom] iradas ĉie grupoj da rifuĝintoj. Ili devenas de Afganijo, Bangladeŝo aŭ Niĝerio, fuĝinte militon, serĉante laboron por apogi sian familion.

La afganoj volas atingi Germanijon aŭ Belgijon. La niĝerianoj diras, ke ili volas resti en Hungarijo. Kaj la bangladeŝanoj survojas al Francijo. Nun ke ili estas en Ŝengenio, ili rajte povas transiri la landlimon, dume ili estas flegataj en improvizitaj tendaroj. Tie ili povas elekti ĉu ili volas peti azilon aŭ deziras vojaĝi plu.

La urbestro de Ásotthalom havas bienon ĉe la limo. Li nomas la situacion neregebla. "Ĉirkaŭ limfosto E457 ĉie vi vidas pruvojn de la neleĝa kruciĝo. Ladojn da nutraĵo, kun grekaj literoj sur ĝi, disŝiritan trajnbileton al Serbijo." La fuĝantoj volas lasi neniun pruvaĵojn ke ili venis laŭ la balkana itinero, ĉar ili timas ke ili estos resenditaj al la loko de enveno. Kiel la eŭropa burokrataro funkcias, tion ili aŭdas dumvoje unu de la alia.

La urbestro opinias ke Eŭropo havas neniun ideon pri kio okazas tie ĉi. "La Ŝengena limo estas likema kiel korbo, oni devas agi pri ĝi". Li estas forta subtenanto de la barilo kiun la registaro intencas konstrui inter Serbijo kaj Hungarijo. 175 kilometrojn laŭlonge de la limo, 4 metrojn alta.

"Ili ĝenas la loĝantaron, ili dormas en grenejoj, tio devas finiĝi," diras la urbestro. La ideon, ke alta barilo ĉe landlimo en 2015 laŭdire estas kontestinda, li forbalaas: "En Usono ili ja faras same sur la limo kun Meksiko?"

Germanoj manifestacias ĉe barilo de Bulgara-Turka limo [20]

Ĉirkaŭ cent aktivuloj el Germanijo dimanĉe kunvenis ĉe la limon de Bulgarijo kun Turkijo. Ili postulis ke Bulgarijo malkonstruu la en julio konstruitan ferrastran barilon por malhelpi enmigradon el Turkijo. La manifestaciantoj montris tondilojn al la landlimaj policanoj, indikante ke la barilo devas esti distruata, kiel tio okazis

[19] el http://nos.nl/artikel/2043590, 26-6-2015 (Nederlanda televido)

[20] Nederlanda reta novaĵoservo "NU.nl", 9-11-2014

la 19an de aŭgusto 1989 al la pikdrato ĉe la limo inter Hungarijo kaj Aŭstrijo.
Tio estis la unua oficiala malfermo de la fera kurteno kaj la enkonduko al la falo de la Berlina Muro la 9-an de novembro 1989.
La bulgaraj landlimaj policanoj malaprezis tiun agon kaj provis teni la manifestaciantojn for de la barilo. En ĉirkaŭaĵo de Jambol, kie la agado okazis, fuĝantoj de la civila milito en Sirio eniris Eŭropan Union, antaŭ la fermo de la landlimo.

Azilpetantoj kaj migrantoj en Serbijo [21]

Unu landlimon sur la okcidentbalkana itinero ni ankoraŭ ne konsideris: tiun inter Makedonijo kaj Serbijo, simple ĉar ĝi ne donas politikan problemon. Inter makedona Tabanovce kaj serba Preŝevo migrantoj ne estas haltigitaj aŭ arestitaj.



Limregiono inter Makedonijo kaj Serbijo

Je la 15a de junio en 2015 la proparolanto de UNHCR, Mirjana Milenkovski, deklaris, ke lastatempe kreskis la nombro de rifuĝantoj el batalŝirita Meza Oriento kaj Afganijo tra Makedonijo al Serbijo, kaj ke po ducent homoj tage serĉas helpon de Ruĝa Kruco kaj de la municipo de Preŝevo. Novaĵservo http://inserbia.info mencias 20-7-'15, ke reprezentanto de Serbijo en Eŭropa Parlamento diris, ke Serbijo akceptis pli ol 30 000 migrantojn en akcepto-centroj. Li ne diris, ke en 2014 nur kvar migrantoj el 16 500 petintoj ricevis statuson de rifuĝinto en Serbijo. En la unuaj kvin monatoj de 2015 estis 22 182 azilpetoj.

Supozeble estas multe pli granda nombro de tiuj kiuj nur trapasas Serbijon

[21] www.kt.gov.rs/en/news/news-archive/200-migrants-reported-in-presevo-per-day

survoje al la "riĉa" Eŭropo. La kapacito de la kvin serbaj akceptocentroj estas 780 homoj ….
Sinjorino Milenkovski diris: "Laŭ internaciaj normoj kaj Serbaj leĝoj pri azilo, transiro de limoj de homoj kiuj fuĝas militon kaj persekutadon en siaj propraj landoj, rasan kaj religian maltoleremon, ne estas konsiderata kontraŭleĝa transiro, ĉar ili forkuris de milito" kaj ŝi rimarkigis, ke en la lastaj kvin jaroj, ekde la civila milito en Sirio, la duono de ĝia loĝantaro translokiĝis el la lando.

Historio de la barilo inter Turkijo kaj Grekijo [22]
Reage al premado de EU, Grekijo jam frue serĉis manierojn por ŝlosi sian limon kun Turkijo. En 2011 kaj 2012 Frontekso investis proksimume 37 mln da eŭroj en "Operacio Pozidono" por sekurigi la Grekan-Turkan limon. Sed tio, laŭ la Greka registaro ne sufiĉis. Preskaŭ 100 000 migrantoj ja estis arestitaj en 2011 dum klopodoj eniri de Turkijo kaj Grekijo timis, ke pro la batalado en Sirio la interlimo fariĝos pli invitema. La aŭtoritatoj esperis, ke krado fortimigos ilin. En 2012 komenciĝis la konstruado de krado kontraŭ migrantoj kronita de pikruldrato, 12,6 km longa, 4 metrojn alta, kostoj 5,5 mln da eŭroj. Ĝi aperis en la regiono de la rivero Evros (bulgare: *Marica*; turke: *Meric*; greke: *Evros*), inter Edirne kaj Orestiada. Tie la rivero portempe forlasas la Grekan landlimon por eniri la eŭropan parton de Turkijo. Aldonaj 1800 policanoj estis deplojitaj kaj novaj internigejoj por migrantoj malfermitaj.
Eŭropa Komisiono estis priskribinta la kradon senutila: "Kradoj kaj muroj estas provizoj por mallonga tempo, kiuj ne solvas la problemon. EU ne pretas kaj ne pretos kunfinanci la kradon" proparolanto pri enlandaj aferoj komisionanino Cecilia Malmstrom diris al ĵurnalistoj en Bruselo, sesan de septembro 2012a.
Precize unu tagon pli frue Ĥristos Papustis, antaŭa Eŭropa komisionano kaj tiam Greka ministro por enlanda sekureco diris, ke la krado havas "valoron kaj praktikan kaj simbolan". Dum januaro 2012a kelke 2800 migrantoj klopodis transiri la landostrion, malpli

[22] kunmetita el "EUobserver" (Bruselo, 7-2-'12), "Der Spiegel" (germana, 11-9-'14), "Today's Zaman" (Ankaro) kaj "Vice News" (hispana, franca, angla)

ol la duono de po 6000 monate dum pasinta somero. Plej multaj venas el Afganijo, poste el Pakistano kaj Bangladeŝo. La plimulto petas azilon. Migrantoj el la norda Afriko estas la due pli larĝa grupo, inter ili precipe alĝerianoj kaj marokanoj. En januaro 2013 UNHCR raportas: "Dum la krado fine reduktis nombrojn de kontraŭleĝe enmigrantoj je 95 elcento, ili turnis sin en kreskantaj nombroj al la maro kaj la grekaj insuloj de la Egeo".

***Today's Zaman*, 10-2-'15**[23]:
Gjorgos Ĥondros (Γιώργος Χόνδρος), membro de la plenuma estraro de Syriza [Ŝiriza], diris pasintan mardon, ke la ĉeesto de krado sur la greka limo estas fonto de honto por demokratia lando kiel lia. "Grekijo estas pordo al Eŭropo ……. sekurigi la limon de Eŭropo per pikdrata barilo sendas negativan mesaĝon al la mondo." Ĥondros krome diris ke Grekijo devos forlasi siajn limigajn provizojn kontraŭ neleĝaj migrantoj. "La azilpolito[24] de Grekijo estos fundamente ŝanĝita. Ni donos mesaĝon, ne nur por Grekijo sed same por Eŭropo."
La pikdrata barilo fariĝis fonto de debato kiam asocioj pri homaj rajtoj argumentis ke ĝia ĉeesto pelas ne-regulajn enmigrintojn al provado de riskaj martransiroj.

***Vice News*, 4-2-'15**[25]:
La nova registaro de Syriza ĵurkonfirmis Tasian Ĥristodulopulu, aktivulino pri homaj rajtoj, kiel respondeculon por migrado. Grava fokuso de Ĥristodulopulu estas malfermaj landlimoj por fuĝantoj. Devas aperi truoj en la fifama barilo sur la greka-turka limo. La antaŭa registaro igis konstrui la kradobarilon, konatan ankaŭ kiel 'la muro'. Ĝi devis funkcii kiel senkuraĝiĝilo, tamen duobliĝis la nombro de azilpetantoj.
"La barilo havas nur simbolan kialon. Ĝi ne protektis nin, ĉar multaj homoj venis tra la insuloj. Tiu ĉi muro solvis nenion. Devas do esti

[23] http://www.todayszaman.com/anasayfa_greek-official-says-fence-on-border-with-turkey-should-be-dismantled_372278.html
[24] polito = ĝenerala kondutmaniero de instituto aŭ registaro rilate al iu afero, angle: *policy*
[25] Internacia agentejo por *trarompaj sciigoj*, Novjorko; vidu wiki/Vice_News

malfermaĵo por fuĝantoj, tiel ke ili povu normalmaniere peti azilon," diris Ĥristodulopulu.
La nova registaro volas liberigi ankaŭ tiujn enmigrintojn, kiuj ankoraŭ estas enfermitaj. La antaŭa registaro enfermis azilpetantojn kaj enmigrintojn en unu el la dudek fifamaj arestejoj. UNHCR ofte frapetis Grekijon pro "nehoma traktado" en la centrejoj.
La nova greka registaro decidis liberigi kelke tridek personojn ĉiutage. "Tio estas eksperimento, la laŭgrada liberigado de homoj. Ni volas rigardi kio okazos kaj kiom da novaj homoj venos al Grekijo," diris Ĥristodulopulu.
EU rigardas la grekan direktoŝanĝon kun suspekto. Al la plano malfermi la limojn jam venis maltrankvilaj reagoj. Sed Ĥristodulopulu volas iri plu. Ŝi volas justan distribuadon de azilpetantoj venintaj el trans la eŭropaj landoj. Identec-esploro devas determini la landon en kiu rifuĝinto plej bone povas peti ŝirmejon.
Preskaŭ 200 000 homoj surteriĝis al Grekijo ekde januaro ĉi-jare, dum aliaj 110 000 faris tion al Italio. Ili ankoraŭ estas akceptataj kun emocio, sed kiom longe tio daŭros, se Eŭropo ne kunfinancos?

Nokto Limo Morgaŭ ĉe la Greka-Turka landlimo[26]

Ali kaj Naser estas du junaj arabaj viroj (Naser estas palestinano kaj Ali siriano) kiuj de la turka urbo Edirne, proksime al la turka-greka limo, helpas al fuĝintoj por kontraŭleĝe transiri la limon al Grekijo. Lastatempe precipe estas fuĝintoj el la hejmlando de Ali, pliparte viroj kiuj estas premitaj inter la registara armeo, kiu postulas de ili pafi al civiluloj, kaj ribeluloj kiuj ĉasas soldatojn. La limo, kiu parte iras laŭ rivero, estas monitorata pli kaj pli strikte en kunlaboro de eŭropaj aŭtoritatoj, kiuj deplojas kreskantan nombron da homfortoj kaj rimedoj por haltigi la fluon de fuĝantoj. Tio daŭre plidanĝerigas kaj plimalfaciligas por la du viroj la laboron de kontrabandado. La filmisto ĝishaŭte registras ilin, dum ili lantas en sia apartamento, fumante, parolante pri sia familio en la hejmlando, kien eble neniam ili revenos, kaj kie ili planas siajn agojn kun klientoj. La kamerao ankaŭ akompanas ilin en vojaĝo al la limo. Ŝajnas esti sufiĉe

[26] *Nacht Grenze morgen,* 30-minuta dokumentarfilmo de Tuna Kaptan kaj Felicitas Sonvilla. Vidu www.thoseattheborder.com, 2013

senespera ekzistado kaj por la du junaj viroj kaj iliaj klientoj, el kiuj ĉiam malpli atingas Grekijon.

Streĉiĝoj inter Italijo, Francijo[27] **kaj Britijo**

En junio plurajn tagojn, Italijo staris vaporkape kontraŭ Francijo. En la itala landlima vilaĝo de Ventimiglia [Ventimilja] tendumas 200 migrantoj el Sudano kaj Eritreo. Francijo akuzas Italijon surtreti la eŭropan azilleĝaron, Romo argumentas ke migrantoj rigardas Italijon kiel transirlandon. La itala polico la 16an de junio perforte malokupigis la tendaron en Ventimiglia, dum Ruĝa Kruco faras krizrifuĝejon en la trajnstacio de tiu urbo.

Sekvanta kriza evento estis la amasa malreguligo de la trafiko tra la tunelo, kiu ligas Britijon kun Francijo apud Calais [Kale] 28-7-'15, kiam 2300 rifuĝintoj samtempe klopodis salti sur kamionojn kaj trajnojn. 20-8-'15 publikiĝis interkonsenton inter Britijo kaj Francijo atingis pri popaŝa fermado de la centro por rifuĝantoj, nomata "la ĝangalo", malfermi kune mastrumatan centron for de Calais, kontraŭbatali la ŝakrobandojn. Nun krado, kvar metrojn alta, 400 spionkameraoj, 200 gvardianoj kaj 500 aliaj sekurecigistoj ĉirkaŭas enirejon de Eŭrotunelo.

[27] el *Het laatste Nieuws* (belga), 16-6-'15

Arab News: Fuĝantoj promenas laŭ la pikdrata kradaro sur la ĉefa vojo al la pramhaveno en Calais, norda Francijo, 31-7-'15

EU-landoj ne atingas interkonsenton pri divido de migrantofluoj [28]

"Tia divido estas necesa al Italijo kaj Grekijo, kie plimulto da migrantoj alvenas, por doni al ili la ŝancon akomodi siajn skemojn de loĝigo kaj asistado", diras Jasper Kuipers, vicdirektoro de *Laboro por Rifuĝintoj Nederlando*[29]. "Pro la ne-atingo de konsento mi timas plej malbonon. Nun jam vi vidas ke en tiuj landoj la fuĝintoj surstratiĝas kaj kelkfoje eĉ trafiĝas en malliberejo."

Pro la malaprobo de la deviga nombro, restas validaj la interkonsentoj de la Traktato de Dublino. Ĝi diras ke fuĝintoj devas esti akomodataj en la lando kie ili eniris Eŭropon. "Plimulto da fuĝantoj alvenas en suda Eŭropo. Kiel rezulto, tiu interkonsento estas ne plu defendebla."

La anstataŭa ideo de libervola distribuado de fuĝantoj trans Eŭropo sonas bone, sed estas "tre seniluziiga". Kuipers opinias pri la rezulto de la konsultiĝoj de la EU-gvidantoj, ke ili maltrafis la okazon por doni ĝustan direkton al la politiko pri enakcepto de migrantoj.

Trans mediteraneo al grekaj insuloj[30]

Ĉiutage centoj da rifuĝintoj el Norda Afriko kaj Meza Oriento prenas 40-minutan boatveturon en plenbloveblaj flosoj de Turkijo al la paradiza feriinsulo Lesbo.

Lesbo estas en Egea Maro kaj estas la tria plej granda de la grekaj insuloj. Aŭtoritatoj tie diras, ke ili estas superŝutataj de grandaj nombroj da migrantoj alteriĝantaj. Ĝis nun ĉi tiun monaton, 4500 faris la vojaĝon. La loĝantaro de Lesbo estas nur ĉirkaŭ 86 000.

La boatveturo estas relative mallonga, sed multekosta. Kontrabandistoj onidire ŝarĝas ĉirkaŭ € 850 por persono. Kaj sekura pasado estas tute ne garantiita. La fuĝantoj devas unue preteriri la turkajn gvardi-ŝipojn por povi sekvi la veturdirekton. La ŝakristoj instrukcias al ili tuje detrui la floson kiam ili alvenas bordon. Tio malebligas resendi ilin en la boato tien, de kie ili venis.

---

[28] el raportoj de *nos.nl* (Nederlanda Publika TV), 26-6-'15, nos.nl/artikel/2043527

[29] *Vluchtelingenwerk Nederland*

[30] resumo de artikolo de *Public Radio International* (Usona/BBC), 8-7-2015.

Ĉe unu strando sur la norda bordo de Lesbo ondoj ruliĝis trans dekoj da nigraj malŝveligitaj gumflosoj. Brilkoloraj savveŝtoj de plenkreskulaj kaj infanaj grandecoj estis disĵetitaj sur la rokoj. Ĵurnalistino spektis la alvenon de ŝipo: "Ni vidis 45 homojn surbordiĝantaj. Ili grimpis sur la rokojn, la virinoj, infanoj kaj beboj unuaj, kaj poste la viroj. La infanoj estis trempite malsekaj." La flosoj ne povis transporti pli ol 15 homojn. La ŝakristoj certigis rekapti la motorojn de la flosoj por estonta uzado.

Multaj el la rifuĝintoj kun kiuj ŝi parolis sur Lesbo originale venis de la siria urbo Alepo, sed iuj venis de landoj tiel malproksimaj kiel Afganijo kaj Pakistano.

Restas preskaŭ 60 kilometroj da piedirado de ĉi tiu strando al la tendaro por rifuĝantoj. Aŭtoveturigi ilin laŭ tiu distanco estas malpermesite kaj iuj turistoj, kiuj faris tion eĉ estis arestitaj pro tio.

Homoj alvenintaj la strandon ne ricevis oficialan helpon, nur iujn nutraĵojn kaj akvon disdonatajn de lokaj volontuloj. La ĵus alvenintaj rifuĝintoj estas nun en tendaroj atendantaj grekajn aŭtoritatojn por prilabori la paperaĵojn. Plej multaj esperas vojaĝi al aliaj partoj de Eŭropo.

Atinginte la insulon Lesbo, migrantoj serĉadas siajn posedaĵojn, 18-6-'15. Ĝis tiam en 2015 48 000 fuĝantoj atingis grekajn marbordojn, en tuta 2014 34 000.

Espero[31]

(tradukita de Esperanto-rondo de Popola Altlernejo Kronach, Germanijo)

Iomete klinita li ascendis la deklivon.

La muŝoj zumadis ĉirkaŭ lia kapo, kaj nun, kiam la varmeco de la posttagmezo iom post iom malfortiĝis, kelkaj nuboj ekaperis en la somera ĉielo. Mallerte li eksidis sur la benkon. Tie ĉi, sub la aĝa, ombra pomarbo li sidis prefere. Ek de ĉi tie oni povis vidi kaj la malgrandan loĝdomon kaj la ĉirkaŭajn kampojn, iom dekstre la vilaĝeton kaj en la fono Ŝvaban Ĵurason. Sed la paco, kiu regule lin ekprenis, rifuzis veni; tro granda estis la strečiteco. Senĉese vagis lia rigardo serĉanta de la tegmenta gablo trans la vastecon de la kampoj ĝis al la horizonto.

Tioma multo ŝanĝiĝis dum la lastaj jaroj, la malplej multo al pli bono. Sed li estis restinta neŝancelebla optimisto. Lia filo Aaron ankoraŭ antaŭ malmultaj tagoj insultis lin `stultulo´, antaŭ ol li foriris kun edzino kaj infano. Eta punkto en la ĉielo ekscitis mallonge lian atenton. Sturno flugis en la direkto de la ĉerizujo. Iam lia edzino kutimis sidi apud li, sed ŝi mortis jam antaŭ kelkaj jaroj. Tioma multo estis ŝparita al ŝi. Sed ĉu Aaron havis entute alian alternativon ol foriri? Homoj kiaj ili ne plu volonte estas vidataj en tiu ĉi lando. Septembron pasintjaran likvidiĝis al la judaj advokatoj la permeso praktiki ilian profesion. Tio estis granda aflikto por Aaron.

Nur du monatojn poste oni malpermesis al Sarah frekventi la lernejon. Triope ili rifuĝis al li. Malgraŭ la tuta strečiteco la vintro estis bela. Vespere ili aŭdis scivoleme la radi-novaĵojn, dumtage Sarah ne ĉesis alflanki sian avon. Kun plej granda plezuro ŝi

[31] rakonto de Iris Otto el „Neue Brieftaubengeschichten“, Krauß Verlag, Freisach (2013). S-ino Otto, nask. en la jaro 1962 en la germana urbo Hannover, vivas en Liederbach. Ŝia profesio estas vendistino en turistentrepreno. Ĝis nun ŝi publicis diversajn tekstojn en antologioj de noveloj kaj mallongaj krimrakontoj.

aŭskultis liajn malnovajn judajn rakontojn. Sarah partoprenis ankaŭ lian fascinon pri la kurierkolomboj. La kolomboj estis lia tuta fiero. Multajn horojn ili duope purigis la kolombejon sub la tegmento kaj provizis la bestojn. Rapide Sarah konis ĉiun unuopan kolombon laŭnome, sciis pri ĝiaj preferoj kaj apartaĵoj. Printempe en klaraj tagoj kelkaj kolomboj estis enkorbigataj, kaj perpiede ili ambaŭ migris kun puŝoĉaro trans la kampoj direkte al Ĵuraso. Post abunda posttagmeza manĝo Sarah urĝis ilin al ekiro. La ekflugigo de la kolomboj estis la kulmino de tiu ĉi ekskurso. Neniam ili preterlasis transdoni al la kolomboj etajn informojn. Sur la reirvojo la espero ĉiam rapidigis la knabinon por esti pli rapide hejme ol la kolomboj.
Sed finfine ankaŭ la kurierkolomboj malpermesiĝis al la judaj bredistoj. Li mem estis kun Sarah survoje al la flugotrejnado, kiam venis la komunumestro kun du helpantoj por forpreni la kurierkolombojn. Ili faris plenan laboron, kunprenis ĉiujn kolombojn inkluzive la kaĝon kaj detruis la plej grandan parton de la kolomb-ejo. Kolera kaj trista Sarah helpis ripari la flekse deformitajn dratojn kaj la dissplititan lignon por siaj tri restintaj kolomboj.

Por Aaron kaj lia edzino la eta domo, la nenionfarado, la necerteco kaj la kreskantaj onidiroj pri milito iĝis netolereblaj. Ili decidiĝis ekfuĝi. Li sciis nenion diri kontraŭ tio krom sian esperon, ke en la eta vilaĝo nenio okazos al li.
Ili estis for de tri tagoj. Li ne estis povinta kundoni ion al ili krom siajn bendezirojn, iom da provianto kaj siajn tri kurierkolombojn. La adiaŭo estis eble la plej peniga aflikto en lia vivo. Nun restis por li

nenio alia ol atendi, kio okazus plu en Germanijo, kaj atendi iun signon. Li sidis jam longe sur la benko, ĝis li vidis la kutiman konturon en la ĉielo kaj aŭdis la al li mankintan kveradon de kolombo. Rapidgambe li kuris al la domo kaj ascendis supren al la subtegmento. La unua kolombo estis reveninta. Kun tremantaj manoj li prenis la elĉerpitan beston, tenere karesis ĝin kaj trovis ankaŭ la mallongan mesaĝon. Ili estis en Francijo. Ĝis nun ĉio estis bone sukcesinta.

Post kvar pluaj tagoj revenis la dua kolombo: „Estas sur la ŝipo `Hope´. Celo New York. Kun amo A., R. kaj S.“. Dankeme li karesis la intiman plumaron kaj flustradis „Hope! Hope!“. Ĉi tio estus ek de nun ĝia nomo.

Je la tria kolombo li atendis vane.

La pura vojo

Epizodo el la vivo de Vasil Levski

En la inaŭgura komisiono pri la monumento de Levski[32] en Sofio, kies membro mi estis, oni konversaciis pri la granda apostolo de la libereco. Ĉar ĉiuj komisionanoj pli malpli persone konis Levskin, oni rakontis anekdotojn pri lia sentimo kaj braveco ĉe cirkonstancoj plej malfacilaj, pri lia konsideremo kaj malvarmsango en danĝeraj situacioj, kiuj abundis ĉe ĉiu paŝo de lia vagabonda vivo. Ĉiuj ĉi rakontoj, ju pli mirindaj kaj pli nekredeblaj, des pli sanktigis la moralan forton de Diakono kaj aldonis novan brilon al la aŭreolo, kiu ĉirkaŭas lian preskaŭ misteran, legendan bildon, formita en nia imago.

Ivan Grozev, membro de la komisiono, rakontis la jenon:

En la jaro 1870 Ivan Grozev ekvojaĝis pro sia okupo de Plovdiv al Karlovo, kiu estas lia naskiĝloko. Jam estante en Plovdiv, li aŭdis

[32] Vasil Levski, bulgara revoluciulo kaj plej granda nacia heroo, naskiĝis 1837 en Karlovo kiel Vasil Ivanov Kunchev. 21-jaraĝa li fariĝis monaĥo en Sopot. De tio deriviĝas lia kromnomo "Diakono". En 1862 li aliĝis kiel volontulo al la Unua Bulgara Legiono en Belgrado. Lia kuraĝo en bataloj meritigis al li la epiteton "Levski" (leonsimila). Li estis pendigita de turkoj en 1873.

tre maltrankviligan famon pri diakono Vasil Levski. La Apostolo estis en Karlovo, la registaro komprenis tion kaj sendis tien la timigan karserdaron[33], kvardek kvin soldatojn-ĉevalrajdantojn sub haĝulo Ismail agao. Estis ordonite traserĉi tutan Karlovon, trovi kaj venigi Levskin viva aŭ morta. Samtempe oni ordonis al la aŭtoritatoj en la tuta subdistrikto deĵori kaj vigle atenti. Ĉiu vojo, gastejo kaj suspektinda vojaĝanto estis kontrolata de la zaptiehoj[34]. Sciante pri tiuj treege seriozaj iniciatoj de la turka registaro, kiu celis kapti finfine la nekapteblan kaj danĝeran revoluciulon, Grozev estis tre zorgoplena. Kiam li atingis la montaron "Sredna gora" kaj paŝis apud vilaĝon Ĉukurlii, li vidis ke sur la kontraŭa altaĵo, kie estis la ŝoseo, leviĝis polvo kaj aperis taĉmento da ĉevalrajdantoj. Li tuj komprenis, ke tio estas la reiranta taĉmento de persekutantoj, gvidata de haĝulo Ismail agao. Grozev ektremis pro la penso, ke Levski povas esti kun ili, kaptita. Kiam ili alproksimiĝis, li kun serena koro vidis, ke la Diakono ne estas kun ili. Haĝulo Ismail agao, kiu konis Grozev, haltigis lin kaj ili finfumis po unu cigaredon babilante. La taĉmentestro deziris al li bonan vojaĝon kaj forrajdis kun siaj soldatoj.

Grozev vidis, ke je distanco de kvindek paŝoj post ili ekaperis iu ĉevalrajdanto, bulgaro. Tiu viro estis vestita en sakpantalono[35] kaj surhavis fezon. Malalte super sia kapo li tenis ombrelon, por ŝirmi sin kontraŭ la suno, ĉar ĝi ardegis. Pro la ombrelo, li ne vidis la vizaĝon de la vojaĝanto, eĉ ne interesiĝis. Kiam ili renkontiĝis kaj Grozev preterpasis trankvile, li aŭdis, ke la vojaĝanto kun la ombrelo alvokis lin:

- Bajo[36] Grozev, Bonan vojaĝon!

Grozev deturnis sin kaj alrigardis lin. Granda estis lia miro kaj timego, kiam li ekkonis, ke tiu sinjoro estas Vasil Levski.

Ili salutis sin reciproke kaj li komencis riproĉi Levskin, ke tio estas frenezo, vojaĝi kun la taĉmento kaj riski ĉiumomente esti

[33] ĝendarmestro. bulgare: кърсердар *(kârserdar)*, turke: "kır serdarı"
[34] ĝendarmo, bulgare заптие (*zaptie*), turke "zaptiye"
[35] larĝa vira pantalono penda sub la talio kiel sako bulgara "потури" (poturi)
[36] populara alparolo al pli aĝa viro anstataŭ sinjoro, bulgare: "бай" (baj)

kaptita. La riproĉoj kaj mallaŭdoj fare de Grozev, pro lia varma amika simpatio al la Apostolo, kara por ĉiuj, ne havis finon.

Levski ridetis, kaj diris:

- Ne maltrankviliĝu, nun la vojo estas plej pura.

- Do, la vojo estas plej pura nun? Diakono, ĉu vi estas freneza? - koleriĝis Grozev, montrante al li la persekutantaron.

- Rajdante kun la persekutantoj, mi estas en plena sekureco… Al kiu en kapo venos la ideo, suspekti min nun? La tuta mondo estas certa, ke nun Levski sin kaŝas en musa truo …Alteriĝu, alteriĝu!

Malsupreniĝinte de sia ĉevalo, li igis Grozev, kiu estiĝis ankoraŭ pli forte konsternita kaj timigita, ankaŭ alteriĝi, kaj ambaŭ eksidis sub iu ulmo apud la vojo.

Tie Levski rakontis detale pri la danĝero, kiu lin trafis en Karlovo, pro la alarmo anoncita de la turkoj. Ankaŭ pri ĉiuj domoj, en kiuj oni serĉis lin, kiel kaj kie li sin kaŝis kaj kiomfoje lia vivo pendis sur fadeno.

- Mi ja rapidis al Plovdiv. Tie la revolucia afero min bezonas. Post kiam ekiris karserdaro[33] de Karlovo, mi ankaŭ ekiris kun li kiel vi vidas… Se mi veturus alimaniere, ĉiu zaptieho[34] trarigardus min. Nun mi estas trankvila.

- Kaj vi eniros Plovdiv kun haĝulo Ismail agao? - demandis Grozev.

- Nepre, mi tie eĉ miksiĝos kun la taĉmento mem de la persekutantoj. Nu, adiaŭ, mi iru, ĉar mia kunvojaĝantaro malproksimiĝas - diris ridetanta Levski. Li adiaŭis Grozev kaj ekrajdis sian fortan junan ĉevalon.

Post kelkaj minutoj, kiam Grozev estis sur pli alta monteto, li turnis sin kaj alrigardis la vilaĝon Ĉamurlii kaj vidis, ke tie la nizamoj[37] malselis kaj promenigis siajn ĉevalojn. Apud ili bulgaro vestita per sakpantalono[35] kaj kun ombrelo kuntirita, promenigas la sian.

Sofio, majo 1895

rakonto de la fama bulgara verkisto Ivan Vazov (1850-1921)

tradukis Hasan Jakub el Omurtag

[37] nizam = regula soldato de la otomana armeo

Valentin Melnikov: limerikoj

Scienco pri biografio
malsamas ol geografio:
unua – pri kapoj,
alia – pri mapoj.
Jen tia distinga defio!

Enigma person' el Kairo
neniam nudiĝis; jen diro:
"pro granda hontem'
ne scias mi mem –
ĉu ino mi estas aŭ viro?"

Post longa kaj akra kverelo
pentriston forlasis modelo,
ĉar li malmodeste
ŝin pentris senveste
nur restis sur li la ĉapelo.

Respektinda sinjor' el Irlando
jen replikis al rekta demando:
"Estas mia sekreto –
Ekvilibra dieto:
Ĉiumane po glaso da brando!"

Junulin' foje diris: "Liberon!
Mi ne ŝatas sufokan aeron!
Ŝvitas dum ĉi-somer' mi,
indas ion malfermi." –
«Konsentite! Ĉu vinon? bieron?»

Programisto el Timiŝoar'
volis prunti mil eŭrojn, sed ĉar
precizemis la ulo –
do por glata kalkulo
pruntepreni li 1024.

Ŝercoj de Mirić Jadranka

Pulvo

-Paĉjo, kial vi koleris la panjon ?
-Ja, via panjo demandis min: kio estas sur televido?
Mi respondis: - Nur pulvo!

Paradizo

-Paĉjo, kiel nomiĝas bopatrino de Adamo?
-Filo mia, li ne havis bopatrinon. Li vivis en paradizo!

Venis Lalo ĉe kuracisto:

- En lastaj tagoj mi malsaniĝis
- La kuracisto demandis lin: Kion vi trinkas?
- Lalo gaje respondas: Kion vi oferas ?

Nenion por kovri

Antaŭ vendejo, rigardante la motrofenestron virino diras:-Kia bela mamzono! Mi eniros por aĉeti ĝin.
- Kial vi aĉetos ĝin, nek vi havas kion enmeti, nek kovri per ĝi!
- Kaj kial vi aĉetas kalsonojn?

Pirotanoj (Indiĝenoj de Pirot estas konataj avaruloj)
Dum tagmanĝo, en malnovdata familio de piroĉanoj
- Ho, onklino, ni satmanĝis de tiom da legomoj. Ĉiutage papriko aŭ brasiko, kaj ĉe nia najbaro ofte viando.
- Lasu ilin. Ne estas nia kulpo, ĉar ili ne semis legomojn!

INTERNACIA AMIKECA RENKONTIĜO 25-07-'15 BREŽICE, SLOVENIJO

Sabaton, la 25an de julio 2015, honore al la 128a datreveno de la eldono de la Unua Libro, la slovena urbo Brežice gastigis internacian amikecan renkontiĝon de esperantistoj. Ĝin organizis la klubo de esperantistoj de Posavje en Slovenijo kun la temo "Regiona kunlaboro inter Esperantaj societoj". Krom 15 slovenaj esperantistoj partoprenis ankoraŭ 40 esperantistoj plimulte el la najbara Kroatijo.

La partoprenantoj kolektiĝis matene en la Urbodomo de Brežice sub diversaj memorigaĵoj: orumita skulptaĵo de Zamenhof, esperanta standardo kaj surskribaĵo »*Eŭropo – Egalrajteco – Esperanto*«. Partoprenis ankaŭ la prezidantoj de la Kroata kaj Slovena Esperanto-Ligoj.

La vicurbestrino detalege prezentis la municipon de Brežice, sciigante la aŭskultantaron pri investaĵoj en la infrastrukturo, lernejoj, infanĝardenoj kaj en la disvolvigo de turismo, kaj atentigis pri diversaj novaj instalaĵoj: akvoenergiaj elektrejoj de Brežice kaj Mokrice, sporta parko kaj akvocentro.

La centra mesaĝo de la enkonduka prelego de Janez Jug estis, ke necesas pliintensigi la intersocietajn interŝanĝojn de vizitoj per aktiva kunlaboro en la kampoj edukado, kulturo, amuzo, turismo kaj sporto. Sed aparta atento devas esti dediĉita al reciproka asistado ĉe plenumado de aktivecoj en esperantistaj societoj.

Sekvis kultura programo prezentita de la gea ĥoro »*Franc Bogovič*« el Dobova. Sekvis recitaĵoj de poemoj el la buŝoj de Ivana Vatovec, Reneja Mihelič kaj Anton Mihelič.

Dum la paŭzo en la urbodomo la gastigantoj aranĝis regalon preparitan de Reneja Mihelič kaj Ivana Vatovec.
Sekvis prezento de multspecaj aktivaĵoj de pluraj kroataj, de unu bosnia kaj de slovenaj esperantistaj societoj.
Multaj reprezentantoj el Kroatijo kaj el Banja Luka donacis al la organizanta klubo. Mićo Vrhovac el Banja Luka kantis en Esperanto la serban kanton «*Ima dana*«.
Post la fino de la programo en la Urbodomo sekvis rigardado de la kolektoj de la diversspeca, riĉa kaj moderna Muzeo de Posavje.
Post la vizito Ivana Vatovec prezentis al la gastoj la ĉefajn karakterizaĵojn de la urbo Brežice.
La renkontiĝo finiĝis per agrabla kuniĝado en la turisma farmobieno Vimpolšek.
La renkontiĝo donis gravan iniciaton por denova refortigo de kunlaboro inter la kroataj, bosniaj kaj slovenaj esperantistoj, kiu estis jam ege bone disvolvita en la pasinteco.
Feliĉe la renkontiĝo estis riĉe anoncita en multaj komunikiloj. Ĝi havis eĉ sian propran retpaĝon kaj afiŝon, kiuj donis tutecan bildon de tiu grava internacia esperantista okazaĵo en Brežice.

Grupa foto antaŭ la urbodomo de Brežice, kie okazis la amika renkontiĝo

POEZIA VESPERO DEDIĈITA AL VENELIN MITEV EN RAZGRAD

De la 19a ĝis 21a de junio 2015 okazis en Razgrad, Bulgarijo, la ĉiujara tradicia festo EKRA[38]. Estis jubilea renkontiĝo, ĉar la komenco estis en 1991. La partoprenantoj dum la jaroj estis mondfamaj elstaraj esperantistoj el diversaj landoj kaj kontinentoj kiel: Nicolino Rossi, Perla Martinelli kaj Lina Gabrielli el Italijo, Valentin Melnikov el Ruslando, Dimitrije Janiĉić kaj Radojica Petrović el Serbijo, Jaroslav Kroluper el Ĉehijo, Carmel Malia el Malta, Alberto Orive el Hispanijo, Marie-France Conde Rey el Francijo, Evgeni Georgiev el Kazaĥijo k.a.

La unua vespero estis dediĉita al la bulgara multe ŝatata esperantisto, verkisto, ĵurnalisto kaj tradukisto Venelin Mitev. Ĉeestis multaj artistoj kaj aliaj gastoj. S-ino Madĵarova parolis pri lia vivo kaj verkaro. Ŝi emfazis la bonegajn tradukaĵojn de s-ro Mitev el la franca, rusa kaj Esperanto en la bulgaran kaj reen. Mitev estas aŭtoro de la esperanta libro "Tradukarto", tradukis "Desislava ridetas" de Ĝorĝo Silfer kaj estas tradukisto-kolektinto de la "Antologio de la bulgara ampoezio".

Milena Makaveeva laŭtlegis el esperanta poezia libro "Somero cigana", redaktita de esperantista poeto William Auld. En sia antaŭparolo li skribis "Venelin Mitev estas unu el tiuj tro maloftaj, en iu ajn lingvo, poetoj, kiuj ne taksas superflue daŭrigi kontakton kun la popolo. Li parolas, kantas kiel homo ne simpla, tamen dotita, al homoj el ĉiuj niveloj, kiuj ne postulas nur komplikaĵojn en la vivo kaj la artoj…"

Poste eksonis versoj de bulgaraj poetoj kaj de la franca poeto Paul Verlaine [Pol Verlen] esperantlingve en traduko de V. Mitev. Neposedantoj de Esperanto havis eblecon aŭskulti ege belajn versojn bulgarlingve el poezia libro "Eksplodigitaj sonĝoj".

Poste Mitev mem dividis interesajn detalojn pri sia lasta libro "La grandaj amoj de la bulgaraj politikistoj, ministroj, ĉefministroj k.a.", kiu estos baldaŭ eldonita.

Fine la kantgrupo "Sopiro" ĉe la Esperantista domo kun artgvidanto Dimitar Stefanov salutis la gaston per kelkaj kantoj.

Dimitrinka Kateva - prezidanto de *Esperantista Domo pri Kulturo*, Razgrad, Bulgarijo

[38] Esperantista Krea Renkontiĝo "Abritus"

Lillo, 25 julio – 1 aŭgusto 2015

parte laŭ raporto de Jukka Pietiläinen en Ondo de Esperanto[39]

La kongresejo *Lille Grand Palais* estas unu el tiuj novaj kongresejoj, kiuj de ekstere aspektas kiel betona bunkro, sen fenestroj, ne io aparte alloga. Ankaŭ la Esperantaj flagoj, kiuj dum la komenca tago flirtis en pluvo kaj vento, estis hisitaj nur al duona stango, kaj mi ne estis la sola en kies kulturo tio signifas, ke iu mortis.

La centra halo en la dua etaĝo (aŭ la tria, laŭ la kongresa mapo) de la kongresejo estis bona por renkonti amikojn, etosumi, danci ktp. La kongresa kafejo estis en la sama halo kaj eblis aĉeti ankaŭ ion por manĝi.

La pli malgrandaj kongresaj salonoj estis kaŝitaj foje en strangaj lokoj: unue necesis iri al pli supra etaĝo kaj poste necesis malsupri. Iiel ŝajnis al mi, ke ĉi-foja kongresanaro estis iom pli juna ol dum la pasintaj malgrandaj UKoj.

La inaŭgura parolado de Mark Fettes atendite referencis multe al Zamenhofa parolado en la unua Esperanto-Kongreso en 1905. La kongreso certe estis jubilea, kaj tio videblis, sed ne tro multe. La surprizo de la inaŭguro tamen estis kiam la prezidanto de la Akademio Christer Kiselman sukcesis silentigi la aŭskultantaron, kiam li admonis esperantistojn pro lingva maltoleremo. Tio okazis jam antaŭ 61 jaroj en libro *Du malsanoj en Esperanto*, kaj la tendenco kontraŭbatali malŝatatajn lingvajn fenomenojn ankoraŭ daŭras en Esperanto, tiel li diris.

Bedaŭrinde granda parto de la kongresanoj devis sekvi la solenaĵojn en apudaj salonoj helpe de ekrano. La unuaj aliĝintoj ricevis biletojn en la ĉefa salono, dum malfrue aliĝintaj devis kontenti pri la televida ekrano. Tie, laŭ la malfeliĉuloj, etoso mankis.

Ankaŭ aliaj kongresaj salonoj foje montriĝis tro malgrandaj, sed foje ankaŭ aranĝeblis reprezentoj de tiuj teatraĵoj kiuj estis tro popularaj. Interese estis vidi la italan profesian grupon fari teatraĵon pri la sorto de enmigrintoj en Italijo kaj uzi Esperanton kiel komuniklingvon por ne ligi la temon aparte al iu etnolingva grupo.

Unu el kutimaj kongreseroj, la nacia vespero, bonege sukcesis en Lillo. Komence estis kanzona ekskurso tra Francijo, poste sekvis kantoj de

[39] vidu la kompletan artikolon ĉe http://sezonoj.ru/2015/08/uk100-7

vivinta Jacques Brel, belgo kun franceca kulturo. Brile.
La ekrano, kiu en antaŭaj kongresoj ofte restis vaka dum prezentado sur la scenejo, estis bone utiligata: per laŭtemaj bildoj, kantotekstoj por kunkanti ktp. Kelkaj el la kantoj spegulis la nordon de Francijo kiel minejan regionon, tre kortuŝe. La organizantoj montrante sin tiel mondcivitanoj, dediĉis programeron omaĝe al mortintoj de mineja akcidento okazinta en 2014 en Soma, Turkijo.

Solena okazaĵo ĉi-foje estis la ekskursa tago, en kiu oni vojaĝis al Bulonjo-ĉe-Maro kaj tie en la sama urba teatro kiel en 1905 ripetiĝis interalie la inaŭgura parolado de Zamenhof, reprezentita de Brian Moon. Kun flagoj kaj standardoj oni promenis al la stacidoma placo, kie estis inaŭgurita momumento memore al Zamenhof kaj la unua kongreso, kaj plue al la urbodomo de Bulonjo por flirtigi tie la Esperantan flagon.

La kunsido de legantoj de la revuo *Esperanto* estis en unu el la malfacile troveblaj salonoj. Ĉu tial ĝi allogis tiom malmulte da publiko? La redaktoro uzis longan tempon por rakonti pri siaj malfacilaĵoj en la redakta laboro, tiel ke mankis tempo por komentoj kaj demandoj de la legantoj.

Inter la oficialaj decidoj faritaj en la kongreso estis du aparte gravaj: unue temis pri elekto de nova ĝenerala direktoro de UEA. Osmon Buller anstataŭos post duona jaro Veronika Poór el Hungarijo. Ŝi estas 32 jara, iom pli juna ol Osmo, kiam tiu komencis labori en la CO. Buller la lastan fojon ĉeestis en UK kiel oficisto de UEA. Li pensiiĝos en la unua kvarono de la venonta jaro. Plej kortuŝa estis lia lasta oficista kongresa ago. La voĉo de Osmo kolapsis jam en la kunsido “La Centra Oficejo respondas” kaj en la fermo li apenaŭ kapablis diri ion alian ol ”Vivu UEA!”.

Alia grava decido estis jura sendependiĝo de TEJO, kiun la komitato akceptis. Baldaŭ estos perreta voĉdonado de la Komitato por akiri la juran validecon de tio.

Rimarko de Birta Szabolcs, Rumanujo, pri la UK:
La rumana grupeto, similas iomete kun malgranda ŝipeto, kiu baraktas, preskaŭ droninta sur la storma marego(!), fakte la taga, kaj ankau nokta homamaskavalkado, preskaŭ malpermesas la verajn interpersonajn kontaktojn.

Ekstera observanto pri la rezolucio en Lillo

La kerno de la rezolucio de la Universala Kongreso en Lillo[40] estis laŭ mi jam entenata en nur tri subfrazoj:

> La 2695 partoprenantoj ……, **volante kontribui** al la disvolviĝo de la Internacia Jardeko por la Alproksimiĝo de Kulturoj proklamita de Unesko, **atentigas**, ke ĝuste tian multflankan interkulturan dialogon praktikas kaj disvolvas la tutmonda Esperanto-movado en siaj centoj da kongresoj kaj renkontiĝoj ĉiujare; **instigas** ĉiujn aliajn aktivulojn kaj movadojn por interkultura dialogo doni pli da atento al la lingva dimensio de sia laboro……;

Kion UNESKO mem skribas pri la maniero en kiu organizaĵoj povas kontribui al la Alproksimiĝo de Kulturoj?
Mi konsultis la Ĉefajn Kampojn de Aktiveco en la Agadplano por la Internacia Jardeko (2013-2022) kaj trovis:

1. Akcelado de interkompreno kaj reciproka enkono de kulturaj, etnaj, lingvaj kaj religiaj diversaĵoj samtempe per apogado de penado al repaciĝo
2. Konstruo de kadro de kundividitaj valoroj kiuj nutras socian koherecon
3. Dissemado de la principoj kaj labormetodoj de interkultura dialogo per kvalita edukado kaj amaskomunikiloj
4. Kulturado de dialogo por daŭripova evoluo kaj ĝia etika, socia kaj kultura dimensioj.

Bedaŭrinde en la atentigo kaj instigo de la rezolucio de Lillo mi ne trovis unu ekzemplon de plano aŭ realigaĵo de UEA en la sfero de la Kampoj de Aktiveco de la Jardeko. Laŭmezure de tiu rezolucio UEA, kiel konsiderata de ekstera observanto, nur rigardas la umbilikon.

Johan Derks

Aliĝu la 12an de septembro en vilaĝo Hrašćina en norda Kroatijo al **la 13-a renkontiĝon de esperantlingvaj verkistoj kaj tradukistoj** Ĝi komenciĝos per pikniko. Por informoj telefonu 00385-91 4617550.

[40] Vidu http://uea.org/teko/kongresaj_rezolucioj/2015

Rezultoj de KER-ekzamenoj en Subotica, 30-5-'15

Aliĝis dek kandidatoj el tri landoj (Slovenijo, Bulgarijo, Serbijo).

nivelo	**nombro de kandidatoj**	**sukcesis skriban parton**	**sukcesis parolan parton**
B1 skriba	2	2	2
B1 parola	3	3	3
B2	2	2	1
C1 skriba	2	2	2
C1 parola	1	1	1

Loka organizanto estis Aranka Laslo, ekzamenis ankaŭ Stefan MacGill.
La parola parto okazis rete, pere de programo Google Hangout.
La ekzameno estis organizita de la E-societo "Tibor Sekelj" el Subotica.

Raporto de Stela pri la 26-a IJS en Szentgotthárd, Hungarijo[41]

[41] http://dyktatorka.rajce.idnes.cz/IJS_2015/; IJS = Internacia Junulara Semajno

Iom da statistikoj: 65 partoprenantoj el 19 landoj, de Brazilo ĝis Japanio. Niaj streboj por alporti multe da novuloj al Hungarijo sukcesis! Ĉi jare ni havis 21 novulojn (kiu neniam partoprenis antaŭe IJS-on, eĉ por 6 homoj tiu estis ilia unua Esperanto-aranĝo!). Pluraj menciis, ke ili venis ĉar amikoj rakontis kiom bona ĝi estis pasintjare kaj kelkaj trovis ĝin, serĉante junularajn E-renkontiĝojn en la somero.
Ni ekskursis al Kőszeg kaj Aŭstrijo, banis, vingustumis, ludis piedpilkon kontraŭ la loka teamo (preskaŭ venkis, la rezulto: 14-3 al la lokanoj), kantis, dancis, babiladis, lernis plurajn lingvojn, novulumis, diskutis, gufujis, trinkejumis, manlaboris, stelrigardis, koncertumis kaj tre tre bone fartis. Ni ankaŭ aperis en la loka ĵurnalo, finfine oni skribis pozitive pri Esperanto, sen mencii la lingvoekzamenojn!
Ankaŭ ĉi tie mi deziras danki la amasan laboron de la ĉeforganizanto kaj la teamo: Laĉjo Bagó, kaj mi nepre volas nomi ĉiujn aliajn organizantojn, ke vi vidu, kiuj laboras por la junularo en Hungario. Saci Bagó (estrarano de HEJ), Ditta Békési, Zsozsi Bódi, Teó Tóth (prezidanto de HEJ), Bálint Rikker, Veronika Venislovas, kaj al helpantoj: Anett Tóth-Deme, Dániel Bakacsi kaj Baptiste Darthenay.
La laboro ne haltas ĉi tie! Ni jam komencis organizi la IJS-on por 2016. Sed ĝis tiam parto de nia teamo havas la honoron kunorganizi la Junulara E-Semajnon en Eger. Rigardu la retpaĝon http://jes.pej.pl kaj mi ankaŭ sendos pliajn informojn pri ĝi baldaŭ.

transprenita el Libera Folio

Respondoj por paĝo 37: **A2, B4, C1, Ĉ4, D1, E2, F4**

Publika letero de Marian Vochin

pri la 67-a kongreso de la bulgaraj esperantistoj

Inter rumanaj kaj bulgaraj esperantistoj ĉiame estis bona kunlaboro. En la kongreso de 1910 en Sofio, kiun ĉeestis multaj rumanaj samideanoj, oni decidis unuigi la du naciaj Esperanto-gazetojn "Lumo" kaj "Rumana Esperantisto", kreiĝis komuna gazeto "Danubo", redaktita de miksita dunacia komitato kaj presata en Bukureŝto. En la bulgaraj Esperanto-kongresoj partoprenis rumanaj samideanoj kaj en rumanaj Esperanto-kongresoj ĉeestis bulgaraj esperantistoj. Dum la komunisma periodo, kiam en Rumanio estis malpermesita esperantistan agadon, bulgaraj samideanoj el Ruse kaj Kubrat alportis esperantaĵojn por rumanaj esperantistoj. Esperantista movado en Bulgario estis helpata de bulgara registaro. Bulgario estis sola lando kiu havis Internacian Esperanton Kursejon en

Pisanica (montara regiono) kaj ĉe Nigra Maro (Varna). Ankaŭ en Bulgario okazis Universalaj Kongresoj en Sofio (1963) kaj Varna (1978).
Okaze de la 67-a Kongreso de Bulgara Esperanto-Asocio, mi kaj aliaj 5 samideanoj el Rumanio vizitis la kongreson. Ĉeestis ankaŭ 8 samideanoj (laŭ kongresa libro), el Serbio, Kroatio, Makedonio kaj Danio. Kiam mi ricevis Kongresan Libron, skribitan en Esperanto, mi pensis ke la organizado estas en ordo. Sabate oni malfermis la kongreson en la kunvenejo de la urbodomo. Por ni, eksterlandaj samideanoj okazis malbona surprizo. Kiu? Dum la kongresa kunveno oni parolis nur en bulgara lingvo. Ankaŭ la afiŝo kun la kongresa programo estis skribita en bulgara lingvo. Bedaŭrinde, oni ŝanĝis la programon, sed informojn pri tio ĉi oni donis nur en bulgara lingvo. Ni pensis ke ni vizitos la koncerton kun la partopreno de la geaktoroj de Bulgara Esperanto-Teatro (kompreneble en lingvo Esperanto), anoncita en kongresa programo. Granda iluzio! Ankaŭ la aktoroj legis ion en bulgara lingvo. Pri la senhonta konduto, la estraro de Bulgara Esperanto-Asocio ofendis ne nur min, sed ankaŭ aliajn eksterlandajn samideanojn kaj la principojn de la interncia lingvo Esperanto. Eble, la komitatanoj de Bulgara Esperanto-Asocio forgesis la Deklaracion pri Esperantismo.

La Deklaracio pri Esperantismo, akceptita de nia Unua Universala Kongreso (jaro 1905): *La Esperantismo estas penado disvastigi en la tuta mondo la uzado de lingvo neŭtrale homa, kiu "**ne entrudante sin en la internan vivon de popoloj kaj neniom celante elpuŝi la ekzistantajn lingvojn naciajn**" donus al la homoj de malsamaj nacioj la eblon kompreniĝadi inter si, kiu povus servi kiel paciga lingvo de publikaj institucioj en tiuj landoj, kie diversaj nacioj batalas inter si pri la lingvo, kaj en kiu povus esti publikigitaj tiuj verkoj, kiuj havas egalan intereson por ĉiuj popoloj.*

Efika laboro por Esperanto devas tion ĉiam atenti. Propagandistoj de Esperanto devus antaŭ ĉio konsciiĝi, ke venko de Esperanto proksimiĝas tiom, kiom multiĝas ĝia bezono kaj la ebleco ĝin apliki. Sen tio ne povas esti propaganda laboro por Esperanto. Simpla afero lingva, simpla studado de la lingvo, plibonigado, pliriĉigado kaj plilogikado de ĝiaj gramatiko kaj vortaro. Tio estas nur malgranda parto de la poresperanta laboro. **La ĉefa parto de la laboro estas uzi la lingvon praktike, kaj ebligi ĝian uzon. Kiel povas helpi disvastigon de la lingvo internacia tiuj homoj, kiuj mem prenos for de si la povon uzi la lingvon?**

Marian Vochin, Vic-Delegito de UEA, Bukureŝto, Rumanio

Ĉu vi konas la Fundamenton de Esperanto?

A. Kio estas la Fundamento de Esperanto ?

1. vortaro de Esperanto kun proks. mil vortoj kaj gramatiko de 16 reguloj
2. dokumento de Zamenhof kun Vortaro, Ekzercaro, Gramatiko kaj Antaŭparolo
3. la konstitucio de la Esperanta popolo, akceptita en 1905 en Bulonjo ĉe Maro
4. la gvidlinioj de Zamenhof pri la evoluo de la lingvo Esperanto

B. En kiu jaro Zamenhof publikigis la Unuan Libron?

1. 1905 2. 1889 3. 1859 4. 1887

C. Kio estas la Universala Vortaro ?

1. la vortaro, kiu faris parton de la Fundamento
2. la vortolisto kiu aperis en la Unua Libro
3. vortaro el 1910, kiu poste fariĝis la bazo de PIV.
4. la Akademia Vortaro.

Ĉ Konsideru sekvantajn asertojn:

a) *–i' estas oficiala sufikso*
b) *–aĉ' estas oficiala sufikso, sed ne fundamenta*

1. b) estas ĝusta, a) ne estas ĝusta
2. a) estas ĝusta , b) ne estas ĝusta
3. ambaŭ estas ĝustaj
4. ambaŭ estas malĝustaj

D. De kie venas la frazo "Germanoj kaj francoj, kiuj loĝas en Rusujo, estas Rusujanoj, kvankam ili ne estas rusoj." ?

1. el la Ekzercaro de la Fundamento
2. el Plena Vortaro
3. el libro, redaktita de Anna Löwenstein, pri landonomoj
4. el parolado de Zamenhof en Bulonjo ĉe Maro

E. Kiu el la sekvantaj frazoj ne troviĝas en la Fundamenta Gramatiko?

1. la gramatikaj finiĝoj estas rigardataj ankaŭ kiel memstaraj vortoj.
2. Proprajn nomojn oni prefere skribu per komenca majusklo.
3. Anstataŭ la prepozicio *je* oni povas ankaŭ uzi la akuzativon sen prepozicio.
4. Ĉiuj prepozicioj per si mem postulas la nominativon.

F. Kiu el la sekvantaj gramatikaj aferoj estas reguligita en la Fundamenta Gramatiko de Esperanto ?

1. la libera vicordo de vortoj
2. la nerekta parolo
3. la maniero, en kiu presistoj reprezentu ĉ, ĝ, ĥ, ĵ. ŝ kaj ŭ, se la presejo ne povas presi ilin
4. kiel vorto devas esti legata

Respondoj sur paĝo 33

morta infano sur Mediteraneo, foto en Fejsbuk de Khaled Barakeh

rifuĝantoj deTripoli kaj aliaj lokoj
de norda Afriko albordiĝas Eŭropon

Rememorante sian propran militon, Belgradanoj brakumas siriajn rifuĝintojn

Belgrado (AFP) – (prenita el www.dailytelegram.net)

Gordano ne povis dormi la nokton post kiam li renkontis familion de siriaj rifuĝintoj en Beograda parko, kie centoj da migrantoj paŭzas por ripozi antaŭ ol daŭrigi sian vojaĝon al EU. "Mi scivolis tutan nokton ĉu mi devintus inviti iujn el ili en mian hejmon, proponi al ili duŝejon kaj pasigi almenaŭ unu nokton en lito," li rakontas.

La venontan tagon li kaj lia edzino Suzana reiris al la parko kun lunĉo por la familio. "Ni alportis tablotukon. Ni ne volis ke tio estu plia rapidnutra manĝo el plastika saketo, sed io kio rememorigos ilin pri tagmanĝo hejme, almenaŭ por momento," diris Gordano. "Ni manĝis kune, kiel familio kaj amikoj," en la sennoma parko en Karadjordjeva Strato.

Tio estis nur la komenco de ondo da solidareco montrita per Belgradanoj lastasemajne al iuj el la miloj da migrantoj pasante tra la urbo sur sia vojo al kion ili esperas esti pli bona vivo en okcidenta Eŭropo.

Elteninte la hororojn de milito mem kaj gastiginte centmilojn da rifuĝintoj dum la konfliktoj kiuj disŝiris Jugoslavijon en la naŭdekaj jaroj, belgradanoj respondis kun simpatio al la enfluo de migrantoj, kunportante ĉiajn helpojn. Magistratoj kaj homrajtaj organizaĵoj malfermis informcentron, disponigante ĉiujn necesajn informojn al rifuĝintoj en araba, urdua kaj persa pri kie kaj kiel ili povos plenumi siajn bezonojn, sed ankaŭ kiel ricevi medicinan kaj psikologian helpon kaj subtenon. Taksia asocio sendas ŝoforojn senpage al hejmoj de donacontoj por akcepti donacojn. "Homoj daŭre venas al la parko alportante vestaĵojn, manĝaĵon, eĉ monon. Ili ludas kun la infanoj kaj tio estas vere bela, ĝi helpas al la infanoj dummomente forgesi la torturon tra kiu ni iras," diras 28-jaraĝa Hiba.

BBC Novaĵoj: Fuĝantoj el Sirio estas savataj de troŝarĝita migra boato, 20-6-'15

De Standaard, Belgijo: La makedona tumultpolico, 21-8, fajris al miloj da rifuĝintoj, inter kiuj multaj sirianoj, larmigan gason k. blindigajn fulmbril-granatojn por repeli ilin al Grekijo. Ekde hieraŭ validas kriza stato en Makedonijo. La registaro ne scias kiel manipuli la grandan enfluon.